
# NIA  PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna: 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JULIO/SEPTEMBRO 2019** **Nro. 120 (3/19)**










Post la fino de somero, ek denove al laboro: nova kurso en nia sidejo, veturado al kongresoj, vendado de la kristnaska loterio (ni esperas havi la tradiciajn E-biletojn je la 18-a de oktobro), renkontiĝoj kun geamikoj, ktp.

LOKE ...

## ORDINARA ĜENERALA KUNVENO.

La pasintan 31an de majo oni okazigis la ordinaran ĝeneralan kunvenon de nia asocio. Bedaŭrinde ĝin ĉeestis nur 5 membroj. Inter aliaj aferoj oni aprobis la spezokonton de la jaro 2018 kaj la buĝeton por 2019. Tiu-ĉi lasta sumos entute 3.264,00 eŭrojn.

## RENKONTIĜO DE VASKAJ ESPERANTISTOJ.

La pasintajn 15an kaj 16an de junio okazis renkontiĝo de vaskaj esperantistoj en Kasedo (Cáseda)-Navaro. Ĝi estis organizata de Rafael Blanco Arbe kaj la partoprenantoj loĝis en mezepoka domo, kiun li posedas en tiu navara vilaĝo.

Sur la suba foto, en la dua vico, Miren Elizgarai, Marie (Saint Palais), Natxo Apaolaza, Xabier Rico, Antoinette (Saint Palais) kaj Nikolas Xil.
En la unua vico, Rafa Blanco, Igone Manciles (Bilbao), Hegoa, Dominik (Germanio), Octavio Gutiérrez (Bilbao) kaj David Redondo (Bilbao).



Kaj en la sekvanta foto, jen ili denove, dum ekskurso al Sos del Rey Católico, naskiĝloko de la fama hispana (aragona) reĝo.

**LOKE ...**



## FINIĜIS KURSO KAJ KOMENCAS ALIA NOVA.



Fine de junio finiĝis la E-kurso por komencantoj gvidata de David Redondo en nia sidejo. Sed estis fino de nur la unua parto. La 4an de oktobro David ekigos la duan parton, kiu daŭrigos ĝis decembro kaj temos ĉefe pri paroliga agado.

Sur la foto kelkaj gelernantoj de la lasta kurso, kune kun la instruisto dum kafopaŭzo.

Kaj, rememorcele, Octavio donacis al ĉiuj el ili belan verdan esmeraldon.



**H.E.F.**

## LA HISPANA KONGRESO, EN COMILLAS (KANTABRIO).




Finfine la hispana kongreso de la jaro 2020 okazos en la belega urbeto Comillas (Kantabrio), proksime de Bilbao, inter la 30-a de aprilo kaj la 4-a de majo.

Oni nomumis la unuajn membrojn de la LKK, nome:
Prezidanto: Carlos Cordero Huecas.
Sekretario: Pedro Ullate López.
Kasistino: Guadalupe Barcina Amézaga.

Kongresejo: Centro Cultural "El Espolón".
strato Antonio López, 3.
39520 COMILLAS (Cantabria).

Jam pretas la reta formularo por aliĝi: http://esperanto.es/kongresaligo
Pliaj detaloj aperas iom post iom en: http://esperanto.es/kongreso

ATENTU!: **La unua aliĝperiodo, kun rabatitaj prezoj, finiĝos la 30-an de novembro**.
Do, aliĝu kiel eble plej rapide.

**MEMORU** ke, se vi aliĝas al HEF, vi rajtas rabaton en la aliĝo al kongreso de Comillas. Do, profitu kaj aliĝu al Hispana E-Federacio. La HEF-kotizo estas nur 32 € jare (20 € por gejunuloj ĝis 30 jaraĝaj) kaj el tio la Fisko redonos al vi 20% en la IRPF.

## LA "KIĤOTO" PLURLINGVE.




Finfine aperis la eldono de la Quijote manskribita kaj plurlingva, kiun ekpretigadis de antaŭ longe la urbestraro de El Toboso.

Speciala eco estas ke ĉiu ĉapitro estas en diversaj lingvoj, kaj ili aperas manskribitaj de volontuloj kaj ilustritaj per bildoj ankaŭ de volontuloj.

La parto en Esperanto, en kiu kunlaboris Fundación Esperanto, estas la ĉapitro 37 de la dua parto, kaj vi povas trovi ĝin en la suba ligilo, inter la paĝoj 208 kaj 212:

http://bidicam.castillalamancha.es/bibdigital/bidicam/es/catalogo_imagenes/grupo.cmd?path=1544204&interno=S&presentacion=pagina&posicion=208

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 57. Majo 2019)*

**H.E.F.**

## KURSO ĈE UNED 2019-2020.

La kurso de Esperanto en la Centro por Lingvoj CUID de la Universitato UNED finiĝis en junio, sed ni povas konfirmi ke ne temos pri izolita okazigo: la venontan kurson oni denove kunvokos kurson por la nivelo A2. La estraro de CUID krome akceptis la lanĉon de kurso en la nivelo B1. La respondeculoj de HEF kaj de la kurso decidis tamen ke tiu nivelo ne estos lanĉita ankoraŭ por la venonta akademia jaro, ĉar ni ne povas garantii la adekvatan kreon de kvalita materialo pro la mallonga tempo aljuĝita al ties disvolvado. Do, oni lanĉos ĝin por la sekva jaro 2020-2021.

Por tio, HEF lanĉas alvokon al spertaj esperantistoj, por peti ilian kunlaboron en la pretigado de la materialo por krei kurson je nivelo B1 por neĉeestaj lernantoj. Se ni sukcesas krei bonan skipon, ni pensas ke la laboro ne estos tre granda, kaj ĝi povas doni eĉ pli altan prestiĝon por nia agado ĉe UNED. HEF certe rekonos tiun laboron, kaj pretas doni oficialan certigilon, kiel kunlaborantoj, kiujn oni povu utiligi oficiale, kaj ankaŭ kiel merito por instruado. Jam dum la kongreso en Malago kelkaj samideanoj montris sian pretecon kunlabori, kun la kunordigo de Fabián Jiménez, instruisto en mezlernejo en Vélez-Málaga kaj respondeculo de projekto Erasmus. La ĉefa respondeculo de la projekto UNED plu restos Manuel Pancorbo, profesoro de tiu universitato.

*("Bitbulteno" de HEF. N-ro. 58. Julio 2019)*

## ESPERANTISTOJ ELEKTITAJ EN MUNICIPAJ BALOTADOJ.

Kelkaj esperantistaj amikoj estis elektitaj en la municipaj balotadoj okazintaj en majo en Hispanio.



Isidoro Ortega, prezidanto de la esperantista grupo en **Fuenlabrada** (granda urbo de la aglomeraĵo de la ĉefurbo Madrido) daŭrigos kiel Unua Vicurbestro, kaj magistratano pri prezidenteco, modernigo, malferma administrado kaj edukado. Sur la maldekstra foto, Isidoro pozas en la centro, apud la urbestro.

Manel Sales, membro de la klubo **Tarragona** Esperanto, estas la nova vilaĝestro de la bela vilaĝeto **Renau**, kiu troviĝas meze de vitejo, 12 km. for de Taragono. Sur la dekstra foto, Manel ĉirkaŭata de kelkaj samideanoj.



En **Teruelo**, eĉ du anoj de la loka E-grupo Liberanimo partoprenis en la unua loko de siaj respektivaj balotaj organizaĵoj, kaj estis elektitaj kiel magistratanoj de la urbo: Blanca Villarroya (sekretario de la grupo) kaj Anabel Gimeno.

Ni gratulas ilin ĉiujn kaj deziras bonan sukcesan agadon.

*("Bitbulteno" de HEF. N-ro. 58. Julio 2019)*

# TRA LA MONDO …

## EKKONU KAJ UZU ESPERANTO.NET.




Ni invitas vin ekkoni kaj uzi gravan rimedon por disvastigi Esperanton. Esperanto.net estas retejo de UEA, kiu provizas bazajn informojn pri Esperanto, kiel lerni ĝin kaj kiel kontakti landajn, regionajn aŭ lokajn asociojn. Tiuj informoj disponeblas en 66 lingvoj kaj la retejo aŭtomate montras la lingvon de la vizitanto.

*(Gazetara komuniko de UEA. 29/05/2019)*

## FEJSBUKA PAĜO DE UEA.

Ni ĵus kreis afiŝon kuraĝigante membrojn inviti novajn ŝatantojn al la facebook-paĝo de UEA:

https://www.facebook.com/179539493576/posts/10156753868953577/

Kun regula informado pri la Asocio, pri la movado kaj pri Esperanto en la tuta mondo, la FB-paĝo de UEA fariĝis grava ilo por sciigi pri nia afero. Tial ni proponas al ĉiuj invitadi siajn amikojn ŝati la paĝon:

https://facebook.com/universala.esperanto.asocio

Dum la lanĉo de alvoko la paĝo staris ĉe 6.500 ŝatoj. Jam novaj ŝatoj venas. Ĉu ni superos 10.000? Certe per la helpo de ĉiuj. Antaŭdankojn por amplesikigi la atingon de UEA en tiu ĉi grava socia reto!

Ĉiu afiŝo de UEA averaĝe superas 1000 rigardojn kaj havas centojn da interagoj inter ŝatoj kaj kundividoj. Ĉiu libro de la monato anoncita en nia paĝo nun fariĝas furorvendaĵo laŭ la referencoj de nia Katalogo. Inter aliaj avantaĝoj. Do se eventuale se vi estas uzanto de Facebook, estos bele, de ni povos kalkuli je vi por inviti novajn ŝatantojn.

*(Fernando Maya. UEA. 19/06/2019)*

## ELEKTRONIKA MEMBROKARTO POR MEMBROJ DE UEA.




Anstataŭ la tradicia, papera membrokarto ekde nun disponeblas elektronika karto por ĉiu aktuala individua membro de UEA.

La karto estas elŝutebla – post ensaluto – en la retejo de UEA ĉe https://uea.org/via

Se vi bezonas ŝanĝi vian foton, eblas tion fari same ĉe via spaco. La elektronika membrokarto anstataŭas la fizikan membrokarton kiel ankaŭ la antikvajn membromarkojn.

Pliajn detalojn vi povas legi en la samtema afiŝo en la fejsbuka paĝo de Ret-Info.

*(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS http://www.eventoj.hu. 20/06/2019)*

## TRA LA MONDO …

## TRI NOVAJ PARLAMENTANOJ DE LA EŬROPA PARLAMENTO, ESPERANTISTOJ.

En Slovenio elektiĝis, inter 8 slovenaj EP-anoj, Ljudmila Novak, bona esperantistino, kiu jam antaŭ du mandatoj estis membro kaj tre bone kunlaboris kun EEU, pro kio ŝi fariĝis honora membro de EEU (https://eo.wikipedia.org/wiki/Ljudmila_Novak). Ŝi certe estos grava por nia estonta agado.

Ŝi laboras ene de la partio „Nova Slovenio“, kiu estas membro de la grupo de Eŭropa Popola Partio kaj logike aktivos ene de tiu grupo.

Alie, Eduardo Kozyra anoncis ke en Pollando du pliaj esperantistoj elektiĝis. Ili estas: Robert Biedroń (https://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Biedro%C5%84) kaj Ryszard Czarnecki ( https://eo.wikipedia.org/wiki/Ryszard_Czarnecki). Elektiĝis ankaŭ Anna Fotyga, favora por Esperanto.

*(Eŭropa Bulteno. Nro. 192. Majo 2019)*

## UNESKO PAROLAS EN ESPERANTO (TOLOSA, 2020).

Mi ne kompenas kial, kiam oni havas sukceson, kiu plaĉus al la simplaj esperantistoj hejme, tiuj, kiuj laciĝis pagi siajn kotizojn al asocio, kiu ne faras ion kompreneblan, oni hezitas informi pri ĝi.

Ekzemple ke en festivalo de UNESKO oni uzos Esperanton la unuan fojon en la vivo de Unesko. Tio certe meritas gazetaran komunikon pli ol multaj administraj problemoj pri regularoj. Lapenna revenu el via tombo.

Festivalo por la paco organizata de Unesko okazos en Tolosa (Hispanio) la 19an de septembro 2020 (do post unu jaro). **La laborlingvoj de tiu ĉi festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto.** Dum tiu ĉi festivalo, ankaŭ estos projekciitaj filmetoj de kiel eble plej da korusoj tra la mondo, kantantaj por la paco en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de tiuj ĉi kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj: franca, angla, hispana aŭ **Esperanto**. Se vi konas koruson, kiu povus realigi tian 3-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto) aŭ rekte en Esperanto, kontaktu François Lo Jacomo (francois@lojacomo..eu)

*(Renato Corsetti. 11/08/2019)*

### SVEDA MINISTRO SALUTAS LA KONGRESON EN FLUA ESPERANTO!



Surpriza evento de la ferma ceremonio en la ĵus finiĝinta Universala Kongreso estis la videa salutparolo de Amanda Lind, sveda ministro pri kulturo kaj demokratio **EN FLUA ESPERANTO!** La videa saluto estas spektebla en nia fejsbuka paĝo de Ret-Info: https://www.facebook.com/Ret.Info/

*(Ret-Info / Lingvo-Studio, LS. http://www.eventoj.hu. 29/07/2019)*

## TRA LA MONDO …

# BRULANTAJ ARBAROJ.

Necesas distingi inter naturaj fajroj kaj hom-faritaj:

La naturaj okazas en diversaj regionoj, kaj ili kutime nur rilatas la gresojn kaj malaltajn arbustojn – tie ili utilas por nutri la grundon per sia cindro.

La homfaritaj kiel nuntempe en Brasilo, Siberio kaj eble ankau en Madagaskaro, k.t.p. Ili estas akompanataj de arbo-faligadoj por havi terenojn por nutri bovinojn au kultivi sojo-fabojn au simile.

Same malbonas faligi arbojn por produkti ligno-karbon en regiono kie neniu zorgas pri la re-arbarigo. Kiam la densa arbaro estas for, perdiĝas ties efiko teni la humidecon kaj transporti ĝin al pli foraj de la maro terenoj. Detruiĝadas la fekunda grundo – ofte estas nur malprofunda tavolo – pro la sun-radiado, kaj pli poste erozio pro pluvoj aŭ sablo-uraganoj.

Komento AVE/mw: Se Bolsonaro nun diras ke li pretas estingi la fajrojn – tio ne estas pli ol larmoj de krokodilo (post la manĝego); la dezirata efiko – senarbarigi grandajn terenojn - jam okazis. Mi timas ke Amazonio iĝos simile al Saharo kaj Sahelo. En Eŭropo oni lernis antaŭ 200 jaroj ke home uzata arbaro bezonas konstantan re-arbarigon. Alia problemo en Amazonio estas ke kun la arbaro malaperas la indiĝenaj komunumoj, sovaĝaj bestoj, bestetoj kaj multaj ne-konataj plantoj (kiuj iam povus esti utilaj kiel medicino). Jen la tutmonda asocio pri monitorado de arbaraj fajroj: www.gfmc.online/

*(Manfred Westermayer. 27/08/2019)*

# UEA kaj $CO_2$.

Pozitiva novaĵo estas ke UEA eble petos kompenso-pagon por eligita CO2 de alflugantaj kongrespartoprenantoj; tiu mono subtenos i.a. rearbarigojn flanke de samideanaj projektoj. Detaloj kiam ghi efektiviĝos.

*(Manfred Westermayer. 27/08/2019)*

# Ĝuu la finnan venkon de la Esperanto-futbalteamo de TEFA kontraŭ la loka teamo Tiikerit en Lahtio nun en jutubo!

Ĝuu la finnan venkon de la Esperanto-futbalteamo de TEFA kontraŭ la loka teamo Tiikerit en Lahtio nun en jutubo!

La filmo pri la glora futbalmaĉo (finna venko de Esperanto 5:2) dum la UK en Lahtio de la Esperanto-teamo de TEFA kontraŭ la loka teamo Tiikerit nun videblas en la jutuba kanalo Svis-Raporto: https://www.youtube.com/watch?v=qCiaWP53bvA

Viajn dankojn por la bela filmeto bonvolu sendi al Nelida Weidmann, kiu faris la tutan laboron, kiel kameravirino, reĝisorino, tondistino, postprilaboristino kaj produktistino. Plej bone vi povas danki ŝin per viaj komentoj rekte en Jutubo sub la filmo, ŝatigante la filmon, abonante ŝian kanalon SvisRaporto kaj disvastigante la ligilon al viaj geamikoj. (Atentu: Bonvolu ne kopii la filmon, sed indiki en viaj medioj anstataŭe la ligilon al la jutuba kanalo de Nelida, ĉar nur tiel vi subtenas ŝian laboron.)

*(Dietrich Michael Weidmann, komitato-de-uea. 09/08/2019)*